
Turanĝa Luko
numero 17



1-a trimestro 2010

La fianĉoj de Pas-aux-Ânes

En tiu numero vi legos..

D. Baron tradukis fabelon, kiun oni rakontas ne malproksime de Montrésor, fama loko pro sia vidinda « zeo ».	p.1 p.2
M-Cl. Ledoux scipovas rajdi poneon, sed ŝi ne volas traŭmatizi ĝin !	p.3
J-J Moreau estas ne nur tandumanto sed ankaŭ eksa tipografisto, li klarigas tiun metion.	p.3 p.4
La 12an de Januaro, terura tertremo trafis Haition kaj ties ĉefurbon Portoprinco. Tiu, kiu tremigis Abrucon lastan Aprilon estis malpli forta, tamen ĝi mortigis homojn kaj frakasis konstruaĵojn. Franca Cipriani raportas.	p.4 p;5 p.6
3 ŝercoj, tradukitaj de J-M Simonet.	p.6 p.7
« Ĉu esperanto estas sekto ? » Estis debato en nia merkreda kunveno. J. Turbillon raportas.	p.7 p.8
J. Turbillon proponas novan ludon : trovi vortojn, kiuj volviĝas ĉirkaŭ kvadratoj.	p.8

La nuboj malheligis la vilaĝeton de Sennevières*. Ŝajnis, ke la vilaĝo surhavis funebrajn vestaĵojn por entombigi sian kastelestrinon, la edzino de la barono Geoffroy.

Ŝi mortis naskante filineton, kiu mortis kelkajn minutojn post la patrino. La du ĉerkoj kuŝis en la ĥorejo de la preĝejo Sankta Leubais. Ĉiuj loĝantoj, senescepte, venis por, la lastan fojon, omaĝi al la damo de Sennevières, kies afablecon kaj bonecon ili ŝatis. Ankaŭ ili plendis ŝin, ĉar la barono Geoffroy estis brutala, severa, tiom malmolkora, kiom dolĉanima ŝi estis. Post la ceremonio, ĉiu hejmeniris kaj la vivo daŭre fluis en tiu izolita vilaĝo de Turanĝio.

Semajnoj, monatoj pasis. En sia kastelo, la barono iĝis pli kaj pli silentema, pli kaj pli kolerema. La soleco fariĝis por li neeltenebla.

Iun tagon, vizitante siajn terojn des 'Allouaux', li miris pri la beleco de la filino de siaj duonfarmuloj, Perrine, 17 jara, freŝa kiel printempa mateno. De tiam, nur unu ideo lokis en lia kapo : edziĝi kun ŝi ! Ne gravis ilia diferenco de origino, ne gravis ankaŭ ilia diferenco de aĝo, kaj la klaĉoj, kiujn tiu edziĝo estigos, nenio haltigos la decidon de Geoffroy.

Li iris renkonti la gepatrojn de Perrine kaj rektaparole deklaris siajn intencojn, aldonante kun seka tono: « tio okazos la venontan monaton, la tagon de Sankta Vincento. » Kaj la barono foriris sen pliaj klarigoj. Konsternitaj, la gepatroj de Perrine ne klare konsciis, kio okazas. Ilia filino iĝos damo de Sennevières. Tio estis nepensebla kelkajn minutojn antaŭe. Ili demandis sin, ĉu ili ne revis, ĉar kutime la nobeloj edziĝas kun paŝtistinoj nur en feinrakontoj. Tuj kiam Perrine sciis pri la projekto de la barono, ŝi ekploregis kaj preskaŭ ŝvenis. Ŝia patrino ne sukcesis konsoli ŝin. La koro de la belulino batis por la filo de la vilaĝa ŝuriparisto, Pierre, samaĝa knabo, kiun ŝi vidas dum la diservo dimanĉe. Foje, ili kaŝe renkontiĝis, kiam ŝi gardis la ŝafojn en la erikejo de 'Gratte-Chien'. La du junuloj promesis geedziĝi, sed ili parolis prie al neniu.

Perrine bone sciis, ke junulino ne devis kontraŭi la decidon de la

gepatroj rilate edziniĝon. Pro tio, ŝi ne luktis, ŝi submetiĝis. Tamen, ŝiaj ĉirkaŭantaro rimarkis la subitajn ŝanĝojn de ŝia sinteno : mieno malgaja, la okuloj senflamaj, la vizaĝkoloro pala…

La mateno de la edziĝfesto, la patrino rimarkis, ke Perrine forfuĝis tra la fenestro de sia dormoĉambro. En la freŝa neĝo, oni distingeble vidis la spuron de ŝiaj piedoj. Ĝi videblis laŭlonge de la lageto de 'Pas-aux-Ânes' ĝis la digo. Subite, nenio. La gepatroj, teruritaj, komprenis, ke ilia filino preferis ĵeti sin en la malvarmegan akvon de la lageto ol edziniĝi kun la barono. La sekvan tagon, oni sondis la lageton per ligno-stangoj. Trovinte nenion, oni decidis malplenigi ĝin. Vane. Do, oni plantis modestan lignan krucon sur la digo, memore al tiu drama evento.

La tempo pasis. La barono de Sennevières facile retrovis alian edzinon, tiom junan kaj preskaŭ tiom belan kiom Perrine.

Pri Pierre, la ŝuriparisto, ne povante konsoliĝi de la morto de sia amikino, li retiris sin el la mondo kaj iĝis servanta monaĥo ĉe la kartuzianoj de Liget, apud la lageto de 'Pas-aux Ânes', kie ripozis Perrine.



Enirpordego de la kartuzio Liget

Iun kristnaskan vesperon, post la noktomeza meso, antaŭ ol dormi, frato Pierre subite emis preĝi antaŭ la kruco de la lageto. Li ne finis la unuan 'Patro Nia', kiam li ekvidis strangan lumeton, kiel vaglumon, kiu ŝvebis super la akvo. Iom post iom, la aperaĵo ampleksiĝis kaj iĝis homa formo. Pierre rekonis la vizaĝon de Perrine. Ŝi tenere ridetis. Ŝiaj lipoj moviĝis kaj ŝi konfidis al li, per apenaŭ aŭdebla voĉo, ke ŝi tiel venos ĉiun kristnaskan nokton por viziti lin. Kaj ŝia bildo vaporiĝis malrapide kaj malaperis. Poste, ĉiun nokton de Kristnasko, li iris al tiu mistera rendevuo, ĉiam trovante pian mensogon por foresti el la monaĥejo.

Tamen, iun jaron, Pierre ne revenis. Liaj fratoj maltrankviliĝis kaj serĉis lin. Neniam oni lin retrovis. Oni pensis, ke lupoj atakis kaj manĝis lin.

Multajn jarojn poste, iun kristnaskan nokton, ŝtelĉasisto frapis ĉe la pordo de Liget. Tremante, li rakontis al la pordista frato, ke li ĵus renkontis, apud la lageto, du fantomojn, viran kaj virinan, kiuj ŝajne flotis inter la arboj. La kartuziano ne kredis tiun rakonton. Li pensis, ke la viro tro multe drinkis. La ŝtelĉasisto rakontis sian misaventuron al ĉiuj en la vilaĝo. La plej aĝaj de la paroĥo tiam rememoris la tragikan morton de la fianĉino de la barono de Sennevières kaj la neklarigitan malaperon de ŝia amanto Por la plejaĝuloj, sendube, la viro ekvidis la fantomojn de la geamantoj.

Tiu historio kortuŝis la loĝantojn. Ĝi naskis kutimon, kiu pluiĝis ĝis freŝdata epoko. Efektive, ankoraŭ komence de la XX^{a} jarcento, la novgeedzoj de la regiono, la morgaŭan tagon de la edziĝfesto, iris ĝis la lageto de 'Pas-aux-Ânes', ĉirkaŭiris ĝin por meti sian edzecan ligon sub la protekto de Pierre kaj Perrine, elokventaj simboloj de elprovita fideleco.



La lageto 'Pas aux Ânes'

Dominique Baron

**Sennevières [senvjer] estas komunumo, kiu situas 8 km oriente de Loches [loŝ] en departemento Indre et Loire.*

La kvieta poneo

Mi pensis ke estis facile rajdi poneon. Kiam mi volis provi tion, mi devis revizi mian ideon.

La poneo estis kvieta.Tiam mi metis mian piedon en la piedingon kaj mi provis supreniri ĝian dorson. Per la elano de la alia piedo, mi pensis sukcesi !!! Mi sentis la poneon serĉi sian ekvilibron !!! Mi ne estas sportema. Mi devis peti helpon de amiko. Ridegoj de ĉiuj amikoj kaj infanoj ĉirkaŭ mi ! Tamen mi restis dum kelkaj minutoj sur la poneo, por ke la amiko fotu min. Mi ne volis rekomenci alian tagon por ne traŭmatizi la poneon. Eble venontan jaron ?

Marie-Claude Ledoux

JEN MIA EKSPROFESIA VIVO

Unua stadio : tipografo

Mi eklernis mian profesion kiam mi ne estis ankoraŭ dek-kvar jara. Okazis en Loudun, kies nomo signifas : la dunon apud la luno, same kiel Lyon.

Oni uzas la tipometron kiel mezurilon. Kontraŭe al aliaj metioj, la tipografia mezuro estas la cicero (aŭ la « dek du »), kies dekduona parto estas la punkto. Unu metro konsistas el dumil sescent sesdek punktoj. Tiu punkto estas kreita de François-Xavier Didot, ĉirkaŭ la jaro mil sepcent sepdek kvin ; la metra sistemo aperis poste nur en mil sepcent naŭdek du, tial oni plu uzas la ciceron, plie, la punkto estas trifoje malpli dika ol milimetro.

Por komposti, oni uzas kompostilon, en kiun oni enmetas la literojn. Nun, vi scias kial oni nomas nin « humore » belletristroj. La spaceto inter la vortoj estas interspaco, ĝi estas malpli alta ol la literoj. Kiel la literoj, ĝi konsistas el miksaĵo de plumbo kaj antimono… kelkafoje kiam ĝi estas tre maldika (ekzemple duonpunkto) el kupro pli fleksebla ol plumbo.

Por esti bona tipografo, oni devas esti origine « ĉikanemulo », kaj perfektisto por « flati la okulon » de la leganto, la tipografo ŝategas atingi tiun celon. Kiam la presliteroj estas ĉu larĝaj, ĉu mallarĝaj, oni interspacigas inter la vortojn la valoron de E majusklo (nun, per komputilo, oni ne povas fari tiel), ĉiam pensante « ĉu sufiĉas aŭ ne ? » Kelkfoje por plenigi la linion kaj por ne tranĉi vorton, oni kreskigas la spaceton inter la literoj ; kiam oni trouzas tion oni diras « la linio galopas ».

Por komposti oni uzas la fingrojn, kiam la literoj estas tre maldikaj, la ungojn. La tipografo havas ofte longan ungon ĉe la montra fingro. Eĉ post la emeritiĝo mi ne mallongigis ĝin. Oni eltiras la literojn el faketoj, oni devas scii legi « returnite » : 6 similas 9, n similas u, p similas b, q similas d, ktp.


Por scii ĉu oni eraris, necesas rigardi la noĉon kontraŭ la litero, tiel, ĉiuj literoj devas havi la noĉojn samflanke.

Kiam oni volas komponi dikajn titolojn, ekzemple pri afiŝoj oni uzas lignajn literojn, pro pezo.









Ĉiuj literoj estas dudek tri komo kvincent sesdek ses milimetrojn altaj (oni diras « altaĵon pri papero »). La kreo de tiu mezuraltaĵo okazis la dudek okan de Februaro mil sepcent dudek tri. Ĉiuj landoj havas nek saman altaĵon, nek saman noĉon.

Por havi spacon inter la linioj oni uzas interliniaĵon, ĉu el plumbo, ĉu el aluminio, ĉu el ligno kies fleksebleco ebligas komposti ĉielarkan linion. La interliniaĵoj estas malpli altaj ol la literoj, oni ordaranĝas ilin en meblon t.n. interlinišrankon. Kiam, oni eraris oni diras « mi faris litererarojn » ; la plej aĝaj laboristoj ne povas fari tion. La responsulo estas ĉiam la metilernanto. Normale oni devas ordaranĝi la literojn en faketon en la faketaron kaj en la ĝustan faketon. Tiuj kiuj ne volas cerbumi metas la literojn en faketon t.n. « faketo de la Diablo », evidente, la Diablo estas la metilernanto. Kiam ĉi-tiu estas punita, li devas reordaranĝi la literojn en la ĝustan lokon. Ĉiu preslitero havas sian propran nomon, ekzemple « Arial ». Ĉiuj povas esti : larĝaj, mallarĝaj, dikaj, dikegaj, duondikaj, kursivaj, diklarĝaj, dikmallarĝaj, ktp.

La kompostaĵo finita, oni faras presprovaĵon por scii ĉu oni litereraris.

La teksto estas legata de ĉu korektisto ĉu kompostisto, kiu notas per korektosigno la erarojn. La ĉefaj korektosignoj estas :

•la DELEATUR, ia latina verbo signifante forviŝi, forstreki.

•la LAMBDA, la litero l, origine el greka alfabeto, similas ian kruron, kiu serĉas ŝovi sin inter du literojn, por disetendi ilin kaj permesi sin loki en la ĝustan lokon. Lambda signifas aldoni.

•la VERSATUR (aŭ reversatur) signifas returni, ekzemple kiam oni kompostis **6** anstataŭ **9**, **n** anstataŭ **u**, ktp.

Estas ankaŭ aliaj korektosignoj signifante aldoni spacon, malgrandigi spacon inter la vortoj, inter la linioj, mezigi, alineigi, ktp.

Post kiam la kompostaĵo estas korektita, oni enpaĝigas kaj presas ĝin.



La literoj estas ordaranĝitaj en faketoj en la faketaro.
Tiu kompostilo entenas 4 liniojn de vortoj.

Baldaŭ, mi verkos pri la dua stadio : LITERPRESISTO.

Jean-Jacques Moreau

Natura katastrofo

Sulmona, la 6an de aprilo 2009 : 3 h 30. Forta skuo ekvekas kaj forĵetas min el la lito. Tuj mi pensas pri tertremo kaj, kiel pasintece, mi kuras por ŝirmi min sub ĉeftrabo de la salono. La bruego de falantaj aĵoj, de moviĝantaj mebloj en mia kaj aliaj apartamentoj, la balanciĝo de la muroj kaj la ektremo de la pavimo kreis en mia animo momentojn de plena teruro. Mi ekkrias plengorĝe : « panjo mia ! » Mi konscias ke ĉio baldaŭ finiĝos: miaj domo, kunulo, karaj libroj, vivo… Post longaj senfinaj sekundoj, tretante rompaĵojn ĉie dissemitajn, mi direktiĝas al televidilo la plej proksima, kaj ĝin ŝaltas. La unuaj sciigoj kaj la amatoraj bildoj estas konsternaj kaj firmigas la eksceptan eventon. Natura katastrofo, kiu dum kelkaj minutoj trafas ruine precipe la ĉefurbon de la regiono Abruco kaj la najbarajn urbetojn, renversas ties fizionomion.

Mia hejmo, en palaco solida kaj moderna, rezistis al la sismo, sed diversaj antikvaj konstruaĵoj restis damaĝitaj kaj sekve evakuitaj. Tero daŭris tremi longe, tenante min daŭre maltrankvila. Krom tio la sufero pro la dolorigaj sciigoj pri geamikoj kaj parencoj: domoj detruitaj, karaj personoj enigitaj sub la rubo.



Ĉiufoje kiam mi gastigis esperantistajn geamikojn, inter kiuj Jacques kaj Marie France Gaumé, mi plezuriĝis konduki ilin viziti L'Aquilan, kuŝantan piede de montaro Gran Sasso (Granda Stono).



Antikva blazono de L'Aquila (l'aquila = la aglo)



Fontano je 99 kranoj

Ĉiuj retenis konservendan plej altvaloran memoron.

Kiel forgesi la eksterordinaran urbon, kiu havas jarmilan historion, konitan pro la numero 99, la kvanto de ĝiaj preĝejoj, placoj, fontanoj, palacoj ? Ĝi, nome, estis fondita de 99 kastelmastroj kun la konsento de Federiko II dum la 13ª jc.

La sismo de aprilo trafis profunde ne nur Italujon, kiu priploras 309 viktimojn kaj 65.000 evakuitojn, sed ankaŭ la eksterlandojn, kiuj, okaze de G8a Kunveno, devontigis sin en solidareca konkuro. Ankaŭ Francujo promesis kontribui al rekonstruado de la 6jarcentaĝa preĝejo Sanktaj Animoj: simbola monumento de L'Aquila. Ĵusa estas la sciigo pri persona donaco de la *première dame* al Hospitalo S. Salvatore (Sankta Savanto): postakuŝa lulilo, dotata per la plej rafinitaj sistemoj pri intensa terapio.



Kupolo de Sanktaj Animoj

Post preskaŭ jaro, malgraŭ konstanta penado por doni tegmenton al evakuitoj

per domoj starigitaj rapidege, la rekonstruo eĉ ne rekomenciĝas. La abruca popolo, malgraŭ elmetita al peza elprovo, montris dignan kaj voloplenan karakteron, sed nun, antaŭ scenejo de amara kaj nefacila realo, postulas laŭte ke la promesoj estu plenumotaj, kaj ĉies helpo povu prizorgi L'Aquila kaj sukcesu reflugigi ĝin.

Franca Cipriani



Preĝejo Sanktaj Animoj antaŭ la tertremo



Marie-France Gaumé, Pino Lalli kaj Franca Cipriani okaze de vizito de L'Aquila en 2004.

TERNUKSOJ POR LA BUSSTIRANTO

En buso plenigita de gemaljunuloj por vojaĝo al Lourdes adaptita por emeritaĝaj homoj, maljunulino frapetas la ŝultron de la busstiranto kaj ofertas al li manplenon de senŝeligitaj ternuksoj. Surprizate la busstiranto dankas ŝin kaj manĝas ilin plezure.

Post 5 minutoj la maljunulino denove ofertas ternuksojn. La busstiranto denove dankas ŝin pro ŝia afabla ago, kaj manĝas la novan manplenon da ternuksoj.

Post 5 minutoj alvenas alia manpleno. Post dekduo da manplenoj la busstiranto tute satas kaj demandas ŝin :

- Diru al mi, avino, vi estas tre afabla satigi min per ternuksoj, sed ĉu vi ne kredas ke ankaŭ viaj 40 geamikoj ŝatus manĝi kelkajn ?

- Ne, junulo, ni ne havas dentojn por maĉi ilin. Ni nur lekas la ŝokoladon, kiu tutkovras ilin.

■●●●●●●●●●●●●●●●●●●●●■

SINCERECO EN PARO

Aferisto sendas faksaĵon al sia edzino :

Ege kara edzino mia,

Vi komprenos ke, nun kiam vi estas 54jara, mi havas iujn bezonojn, kiujn vi ne plu povas kontentigi. Mi estas feliĉega kun vi, mi rigardas vin kiel mirindan edzinon, kaj mi sincere esperas ke vi ne malbone reagos, kiam vi scios legante tiun faksaĵon, ke mi estas en la «Confort Inn» hotelo kun Vanessa, mia sekretariino, kiu estas 18jara.

Sed ne maltrankviliĝu, mi estos hejme antaŭ noktomezo.

Kiam tiu ulo alvenas hejmen, li trovas sur la manĝoĉambrotablo paperpecon, sur kiu li legas :

Kara edzo,

Mi ricevis vian faksaĵon kaj mi devas danki vin pro via komplezemo. Mi kaptas la okazon por memorigi al vi ke ankaŭ vi estas 54jara.

Kaj mi informas vin ke, kiam vi legos tiun mesaĝon, mi estos en la «Fiesta» hotelo kun Michel, mia instruanto pri teniso, kiu kiel via sekretariino estas an-

kaŭ 18jara.

Ĉar vi iĝis agnoskita aferisto kaj plie havas licencion pri matematiko, vi povos facile kompreni ke ni estas similuloj en tiu cirkonstanco, sed kun eta diferenco :'18 eniĝas pli da fojoj en 54 ol 54 en 18'… Do, konsekvence ne atendu min antaŭ morgaŭ !

Kisoj de via edzino kiu komprenas vin ...»

◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆

LA DU MONAĤINOJ

Iam estis du monaĥinoj. Unu el ili kromnomiĝis Matematika Fratulino (MF) kaj la alia Logika Fratulino (LF).

Iun vesperon kiam eknoktiĝis kaj ili ankoraŭ estis ege malproksimaj de sia monaĥinejo …

MF : Ĉu vi rimarkis tiun viron, kiu sekvas nin de 38 minutoj kaj duono ? Mi demandas min, kion li atendas de ni ?

LF : Tio estas logika ; li volas seksperfortigi nin.

MF : Oh ne ! Je la distanco, kie li troviĝas, li atingos nin maksimume post 15 minutoj. Kion ni povas fari ?

LF : La nura logika farendaĵo estas paŝi pli rapide ol li.

MF : Ni ne sukcesas.

LF : Kompreneble ni ne sukcesas. La viro faris la nuran logikan agon, kiun li povis fari ; ankaŭ li ekpaŝis pli rapide.

MF : Nun kion ni faras ? Post 1 minuto li atingos nin .

LF : La nura logika farendaĵo estas disigi nin. Vi iru ĉiflanken kaj mi iras aliflanken. Li ne povos sekvi nin ambaŭ ĉiujn.

La viro decidas sekvi Logikan Fratulinon. Matematika Fratulino alvenas al la monaĥinejo kaj maltrankviliĝas pro tio, kio povis okazi al Logika Fratulino. Poste Logika Fratulino alvenas.

MF : Logika Fratulino, dank al Dio, vi estas tie. Rakontu al mi tion, kio okazis !

LF : La nura logikaĵo okazis. La viro ne povis sekvi nin ambaŭ ĉiujn do li decidis sekvi min.

MF : Jes, jes, sed poste kio okazis ?

LF : La nura logikaĵo okazis. Mi ekkuris kiel eble plej rapide kaj li ekkuris kiel eble plej rapide.

MF : Kaj poste ?

LF : La nura logikaĵo okazis ; li kuratingis min.

MF : Oh Dio ! Kaj kion vi faris ?

LF : La nuran logikan farendaĵon. Mi levis mian robon.

MF : Oh fratulino mia ! Kaj kion faris la viro ?

LF : La nuran logikaĵon, li mallevis sian pantalonon.

MF : Oh ne ! Kaj kio okazis poste ?

LF : Ĉu tio ne estas logika, fratulino mia ?

Monaĥino kun levita robo kuras pli rapide ol viro kun mallevita pantalono.

Kiuj imagis alian finon, tiuj recitu du « Mi salutas vin Maria ».

J-M Simonet

◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆

Ĉu esperantismo estas sekto?

Unuavide, ne sciante, la vortoj : esperantisto, esperantismo, "odoras" sekte. Kelkaj esperantistoj eĉ preferas uzi esperantoparolanto, (espérantophone). La demando povas esti starigita : ĉu esperantismo, la esperanta movado, estas sekto ?


Esperanto estas nur lingvo sed se oni aldonas la "internan ideon", ĉu ĝi fariĝas sekto?

Por komenci : kio estas sekto? Rimarku ke tiu nocio ne havas juran difinon. La diversaj vortaroj difinas ĝin kiel grupo da personoj kiu disiĝis de iu religio, filozofio, pensmaniero.

Esperanto estas eltrovaĵo de Zamenhof, originalaĵo, funkcianta jam de pli ol unu jarcento, malgraŭ la problemoj.

Pli instrua estas la difino de la adjektivoj:

Volvu vorton ĉirkaŭ ĉiu kvadrato laŭ la sagita direkto



A : cereala kaĉo
B : levo de la brako
C : povas esti akva, vapora, nuklea

M : tago de la semajno
M : li interesiĝas pri mitoj
S : reĝe
S : kun severo ↻ (supra kvadrato)
S : kion oni skrapis ↺ (malsupra kvadrato)

(Sekvo de la paĝo 7)

sekta, sekteca, sektisma. Ĉiuj montras rigoron, netoleremon, striktan obeon al fiksaj reguloj.

Oni eniras sekton, poste, oni ne plu povas aŭ ne plu volas eliri tiel la premoj kaj la povoj estas pezegaj. Sufiĉe da personoj venas al nia movado kaj eliras tute libere, neĝenate ; la prezoj ne estas altaj kompare al tiuj de la sektoj, kiuj prenas ĉion el vi.

Do, Esperantismo ne estas sekteca.

Tamen, ĉu ni ne propagandas niajn ideojn, ĉu ni ne havas "inicianton", nia estimata Zamenhof, niajn sanktajn librojn : la Fundamento kaj la PIV, niajn renkontojn kaj kongresojn ? Do, ĉu esperantismo estas sekto ?

Malfacilas fini la diskuton. Ĉu ni diru: "Esperantismo estas ne sekteca sekto" sed venas alia demando: " Ĉu nesekteca sekto estas ankoraŭ sekto ?"

Estas resumo de debato inter la partoprenintoj de la merkreda renkonto de nia grupo de Tours.

Juanita Turbillon

Atentu :

- 2 vortoj komenciĝas per M (M kaj *M*).
- 3 vortoj komenciĝas per S (S kiu volviĝas dekstren , S kiu volviĝas dekstren kaj S kiu volviĝas maldekstren)
- Ĉiu vorto konsistas el 8 literoj.

Juanita Turbillon

Preparu artikolojn por la venontaj Turanĝiaj Lukoj kaj donu aŭ sendu ilin al la grupanoj, kiuj kuniĝas ĉiujn merkredojn, tiel ili relegos kaj korektos ilin se necesas.

Centre Culturel Esperanto Touraine
Halles de Tours
Place G. Paillhou
37000 TOURS
Tel : 02 47 44 62 12
esperanto-touraine37@wanadoo.fr